WIKIPEDIA

Tuva lingvo

La **tuva** (tuve: **тыва дыл** /tjuva djul/) estas unu el la tjurkaj lingvoj. Ĝin parolas ĉirkaŭ 200 000 loĝantoj de la respubliko Tuvio (en suda Siberio), kie la tuva estas unu el la oficialaj lingvoj. Ĉirkaŭ 27 000 tuvaj parolantoj troviĝas ankaŭ en Ĉinio kaj Mongolio.

La lingvo pruntas multajn radikojn el la mongola kaj iomete el la rusa. Ĝia lingva kodo estas **tyv** (laŭ ISO 639).

Enhavo

Ortografio

Literaturo kaj Kulturo

Proverboj

Gorĝkantado

Eksteraj ligiloj

Ortografio

La originala tuva ortografio estis inventita dum la frua 1930-aj jaroj de tuva Budhisma monaĥo Lopsan-Ĉimit, kiu poste estis silentigita de Stalinistoj. La alfabeto ĉefe uzis latinajn literojn kun specialaj literoj por montri la specialajn sonojn de la tuva. Kelkaj libroj estis presitaj per ĉi tia ortografio, inkluzivante abocolibrojn faritajn por instrui legpovon al plenkreskuloj.

Sub soveta rego, la alfabeto de Lopsan-Ĉimit estis ŝanĝita al la cirila, ankoraŭ uzata hodiaŭ. Tial Lopsan-Ĉimit estis forigita el la historiaj libroj. En la post-soveta epoko, tuvaj kaj aliaj studistoj nun havas renovan intereson en la historio de tuvaj literoj, kaj celas ĝustigi la historian registron.

La nuna tuva alfabeto estas iom modifita versio de la rusa alfabeto, kun tri ekstraj literoj: ӈ (latine "ng", [ŋ] en IFA), ө (latine "ö", IFA-e [ø]), kaj ү (latine "ü", IFA-e [y]). La alfabeto havas precize la saman sinsekvon de la rusa alfabeto, krom ke litero ӈ sekvas literon H, litero ө sekvas literon O, kaj litero ү sekvas literon У. Ekzistas ne majuskla versio de ӈ, ĉar ĝi neniam troviĝas ĉe la antaŭo de tuvaj vortoj.

Literaturo kaj Kulturo

La tuva havas riĉan tradicion de parole rakontata folkloro, kio inkluzivas multajn specojn: mallongajn proverbojn kaj enigmojn, magiajn, heroajn, kaj timigajn rakontojn, kaj eposojn, kiuj bezonas plurajn horojn por plene rakonti. Kelkaj partoj de tuvaj eposoj, kiel ekzemple *"Boktu-Kiriŝ, Bora-Ŝelej"*, eldoniĝas, sed la arto de la tuva lingvo estas minacata de elmorto, ĉar la tradicia rakontistoj maljuniĝas, sed estas ne anstataŭataj de pli junaj lingvanoj.

Proverboj

Jen kelkaj proverboj kiel ekzemploj de la tuva lingvo. La unua linio estas en la tuva cirile, la dua linio estas en la tuva latinalfabete, kaj la tria estas proksimuma esperanta tradukaĵo.

> Сөглээн сөс, керткен ыяш
> *Sögleen sös, kertken yjash*
> Parolita vorto, gravurita ligno (alivorte, oni plenumu sian promeson)

> Далашкан күске сүтке дүжер
> *Dalashkan küske sütke düzher*
> Hastema muso falas en la lakton (t.e. la lakto de la kato)

> Даартагы чагдан бөгүнгү өкпе дээре
> *Daartagy chagdan bögüngü ökpe deere*
> Pulmo-viando hodiaŭ pli bonas ol graso morgaŭ

Gorĝkantado

Tuvaj kantistoj havas unikan stilon de tradicia kantado. Unu kantanto povas kanti per du voĉoj samtempe, akordante kun si. Ĉi tion oni nomas gorĝkantado aŭ "Ĥoomej" (Хөөмей). Tre fama kaj internacie konata muzikgrupo kantanta tiustile nomiĝas Yat-Kha.

Eksteraj ligiloj

- Tuva Vikipedio (https://tyv.wikipedia.org/wiki/%D0%9A%D0%BE%D0%BB_%D0%B0%D1%80%D1%8B%D0%BD), **ekfunkciis en 2013**
- Tuva Vikio (http://www.tyvawiki.org/) (angle kaj tuve)

Oficialaj lingvoj de Rusio	
Tutŝtata oficiala (ŝtata) lingvo	rusa (→)
Lingvoj oficialaj (ŝtataj) en federaciaj subjektoj	abaza · avara · agula · adigea · azerbajĝana · sudaltaja · baŝkira · burjata · dargva · inguŝa · kabarda-ĉerkesa · kalmuta · karaĉaja · komia · kumika · laka · lezga · nogaja · maria · mokŝa · oseta · rutula · tabasarana · tatara · tata · tuva · udmurta · ĥakasa · caĥura · ĉeĉena · ĉuvaŝa · erzja · jakuta
Lingvoj kun oficiala statuso	vepsa · dolgana · kazaĥa (→) · karela · komipermjaka · mansa · neneca · selkupa · finna · ĥanta · ĉukĉa · evenka · evena · jukagira

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Tuva_lingvo&oldid=5817072"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 03:25, 15 dec. 2015.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.